

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 penceoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 108 (Ninth Year) Melbourne (Melbourne), Australio.

10 Junio 1929

EDUCATIONISTS MEET TO DISCUSS ESPERANTO.

One of the most important meetings ever held in New Zealand in the interests of Esperanto took place at Wellington on 24th April when, in response to an invitation issued by Mr. H. Amos, Director of Banks College and Principal of the Wellesley Private College, the three Wellington members of the N.Z.E.A. Executive (Messrs. Jack, Dust and King), together with Messrs. Edmanson and Potts of the Wellington Esperanto Club, met in conference Mr. Amos, Mr. Lomas, Principal, Wellington Training College, Mr. Combs, Headmaster Mt. Cook (Wellington) Public School, and Mr. Lohore of the teaching staff of Wellesley College, for the purpose of seriously discussing international language in general and the claims of Esperanto in particular. That the meeting was highly successful is indicated by the following report.

Mr. Amos was manager of the N.Z. team of athletes at the Olympic games in Amsterdam last year, at which the official languages were English, French and Dutch. He was so forcibly struck by the "farfical proceedings" that he came away a firm believer that an international medium of speech is the only solution to the language problem.

In April, educationists and others in Wellington energetically debated through the Press the reforms to be

introduced shortly into the curricula of the New Zealand schools. It is very encouraging to note the suggestion from a non-Esperantist source that Esperanto be introduced. In view of this, Mr. Amos—himself an educationist—arranged the meeting between the Esperantists mentioned and his colleagues.

All present agreed that no existing national tongue would suffice as an international one. Attention was therefore directed to an artificial language. Mr. Edmanson, as spokesman for Esperantists, briefly outlined Esperanto and its progress, the narrative being supported by Mr. King, who quoted the impartial investigation made by the League of Nations in 1922, and the consequent recommendation for Esperanto. After a keen discussion, Mr. Amos, who presided, stated that, personally, he was satisfied with the case for Esperanto, and enquired if all agreed that it should be supported. Receiving an unanimous reply, the chairman sought information regarding Esperanto in N.Z., Mr. King supplying the relative particulars. Mr. Amos favored the organising of a deputation to the Minister of Education, adding that the Educational Conference was arranged to take place at Wellington about mid-May, and that a deputation to the Minister then would be timely. Mr. Lomas mentioned that at present there are 250 students in the Training College, all of whom are ready to learn Esperanto. After discussion

it was decided to organise as early as possible a deputation to the Minister of Education and to seek permission to teach Esperanto in all N.Z. primary schools (Classes V and VI) and in the secondary schools of the Dominion as an optional subject; also that permission be obtained to teach Esperanto to the students now attending the Training College, or Colleges.

The three N.Z.E.A. patrons—the Prime Minister (Sir Joseph Ward), Sir Robert Stout and Sir George Fowlds—will be invited to associate themselves with the deputation.

The meeting closed with the four educationists ready to begin a course in Esperanto, and a class will be formed, the weekly instruction of which will be given by Mr. Edmanston. Instruction of Esperanto commenced at the Wellesley College on 29th April, and it is expected that soon the class will be augmented.

NEW COURSE IN TRANSLATION.

To Start in July.

For some years, and latterly through these columns, Mr. G. Gordon, F.B.E.A., has guided a course in Esperanto translation, which all capable of writing a letter in clear Esperanto are earnestly invited to join. Both he and the secretary give their service wholly free, a charge of 4d. only being made to cover cost of the English typewritten piece, sent to all members. Those wishful of joining the Traduka Rondo write to the secretary, Miss Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E10, for particulars and the current English piece, to be translated and sent back to her for forwarding to Mr. Gordon, who will compile his notes on observations made during the reading of members' work. It is urged that readers of S.K. be not content merely to read the Esperanto version by Mr. Gordon, but rather to strive for proficiency in the art of readily translating English into sound Esperanto.

It is hoped that the patient labor of the generous organisers of the course will be instrumental in producing many a skilful user of the language of Zamenhof, men and women ready to fill the varied roles that the rapid extension of Esperanto will call into being.

D-RO HAZIME ASADA EN BERLIN.

La 3an de Septembro, prof-o Dro Asada el Tokio parolis en Berlin pri la temo "Jurmedicino en Japanujo." Invititaj estis Esperantistoj kaj individue elektitaj gastoj el la profesia sfero de prof-o Asada.

Ĉeestis ĵurnalistoj kaj kriminalistoj el la ĉefpolicejo Berlina.

Prof-o Asada klarigis la diversajn metodojn, laŭ kiuj oni en Japanujo penas rekonii la krimulojn. Antaŭ sesdek jaroj oni en Japanujo ankoraŭ devigis la krimulojn per mezepoka turmentilaro, konfesi sian kulpon. Kompreneble tiel okazis, ke oni "kar-tis" kaj kondamnis krimulojn, — sed la vere kulpaj ili ofte ne estis — pli kaj pli multe ankaŭ japanaj sciencistoj informvizitis eŭropajn universitatojn, konatigis kun pli humanaj, sed ne malpli efikaj helpiloj, kaj tiamaniere Japanujo iom post iom penadis labori same kiel la eŭropaj kulturlandoj. Prof-o Asada akcentis, ke jam hodiaŭ en Japanujo ekzistas 18 fakaj profesoroj, kiuj grandparte studadis en eŭropaj universitatoj la jurmedicinan sciencon, kaj ke en Japanujo oni nun rekonas la krimulojn per mezurado de fingropremoj, sango-esplorado ktp. same ekzakte kiel en eŭropaj landoj. La parolinto ankaŭ diris, ke nun la japanaj fakistoj posedas eĉ helpilojn kaj metodojn neuzatajn kaj nekonatajn de la eŭropaj kriminalistoj, kaj estas pruvita fakto, ke tial jam hodiaŭ speciale la germanaj universitatoj volonte akceptas japanajn profesorojn kiel insruistojn, oni pli kaj pli multe "interŝanĝas" profesorojn el la japanaj kaj germanaj universitatoj, por ke tiamaniere lernu la unuj de la aliaj. Bedaŭrinde nur estas la lingvaj malfacilaĵoj. La japanoj nur malfacile povas lerni eŭropajn lingvojn, tial ili ankaŭ ne povas doni siajn spertojn al aliaj popoloj. Iom plibonigis la afero, post kiam la japanoj komencis lerni la internacian helplingvon Esperanto. Jam hodiaŭ multaj japanaj sciencistoj verkas en ĉi tiu lingvo, kaj prof-o Asada akcentis, ke nur per Esperanto li mem povas travojaĝi la eŭropajn landojn, tiel kolektante spertojn. Estas nenecese diri, ke prof-o Asada ankaŭ en Berlin parolis en Esperanto. Ernst Wichert, Berlin, interpretis; kiel jam ofte li majstris la tre malfacilan taskon, samtempe pruvante, ke Esperanto taŭgas eĉ por pure sciencaj temoj. — Dro Schneickert kompletigis la paroladon de prof-o

Asada, aldonante klarigojn pri rekono de krimuloj laŭ propraj esploroj kaj spertoj. Per vigla aplaŭdo la aŭskultantaro dankis al la du parolintoj, per tio plej bone montrante sian kontent-econ.

Dro Liebeck en sia finparolo atentigis pri tio, ke verŝajne nur malmultaj el la aŭskultintoj estas komprenintaj ĉi tiun vere interesan kaj pure sciencan paroladon de prof-o Asada, sed tamen ni rajtis diri, ke la parolado fariĝis sukcesa, jam pro tio, ke ni pruvis al neesperantistoj, ke Esperanto estas nepre taŭga lingvo por pritrakti sciencajn temojn. Ni Esperantistoj tion ja scias, sed al la neesperantistaj gastoj oni tion ne povas montri sufiĉe ofte.

—El Germana Esperantisto.

KRONIKO.

CHRISTCHURCH, Nov-Zelando. — Lastkunvene la Societejo entenis 19 anojn. Ĉi-tio mo estas kuraĝiga, precipe kiam oni rememoras ke la meznombro lastan jaron estis 6. Evidente E-to forte dissemiĝas en nia urbo, samkiel en aliaj regionoj de N.Z. Antaŭe la societa laboro estis farata senorde, sed nun estas kompilita laborotabelo, laŭ kiu oni sisteme agas dum ĉiu kunveno. Kiam alvenos jarkon, la grupanoj verŝajne posedos diplomojn. Ankaŭ ni preparas teatraĵon prezentotan en Dec. Laŭ aranĝo por ĉiusesamejna brodkasto de 3YA (Christchurch) Societano parolis pri E-to la 22an de Aprilo. Kvankam Christchurch ne estas ĉefsidejo de E-to en N.Z., ni opinias ke la plej progrese grupo tie aktivis!

WELLINGTON, N.Z. — Ĉesto de membroj kaj ĉi ties progreso estas alte kontentdonaj, sendube la klubo firme stariĝas dank'al vigla laboro de la estraro. Krom provizi okazajn uzojn la lingvon la klubo estas ejo de larĝa edukado, ĉar tie oni pritraktas temojn tre diversajn. Pasintmonate ankoraŭ gazet-vortbatalo okazis pri instruado de la franca k.a. lingvoj en N.Z. lernejoj. Edukistoj partoprenis. Mencion de int. lang. provizis al la N.Z.E.A. sek-cio bonokazon meti frapmaniere E-ton antaŭ legantoj. Je la 7a Majo s-ro W. Edmanson, F.B.E.A., akompanate de s-roj B. Potts kaj W. King, vizitis por lunci la Rotarian Klubon. Al ĉ. 150 rotarianoj, inter kiuj la urbestro, s-ro Edmanson kapable parolis duonhoron pri E-to. Rezulte tion kelkaj rotarianoj eklernos. Ampleksa raporto aperis en "The

Evening Post." S-ro C. Adcock, prez. N.Z.E.A., trapasis ĉi-urbon, veturante al Christchurch kaj Dunedin.

HAMILTON, N.Z. — S-ro Adcock gvidas kurson sub aŭspicioj de la Laborista Eduka Asocio. Jen la duajara kurso aranĝita de tiu asocio.

BRISBANO. — La societo kunvenis je la 9a de Aprilo, kiam oni akceptis "viziton" de du altrangaj "alilandaj" vojaĝantoj. Du societanoj ludis la rolojn unu el Nippon (en konvena kostumo) kaj la alia el "Ĉehohispulajo." La gastojn bonvenigis s-ro Behncken, kaj ili poste parolis pri siaj landoj. S-ro Suess legis tezon pri "Dangeraĵ Insektoj"; oni esperas, ke la temo ne estis aludo pri la gastoj.

La societo diversmaniere reklamas nian aferon per malgrandaj anoncoj en la taggazetoj.

Je la 10a de Junio la societo havos beneficon ĉe la teatro "Royal," kie ludos fraŭlino Nellie Bramley kaj ŝia trupo, per kio ĝi espereble gajnos samtempe monon kaj reklamon.

FROM THE N.Z. FRONT.

Pars in Big Polemic.

Deprecatory remarks on interlanguage by one A. Zimmermann at Geneva having formed the subject of a leader in the Christchurch "Star," that paper opened its columns to a series of letters productive of an enlightening exchange of opinion. Herewith are a few of the barbs that we hope found many a mark. Said s-ano N. M. Bell: — "The acquirement of vocabulary (and the educated Englishman uses, I suppose, some 15,000 words) is, in the national tongues, largely a matter of mere memorising. In Esperanto, words are built up by the exercise of intelligence in a logical manner. Now what the world needs at the present time is the liberalising tendency of intelligence more than the conservative tendency of memory. To use an international tongue, which throughout is a logical product, will react in a wonderful way on man's general behaviour. . . . An Englishman or Frenchman recognises some 70 per cent. of the words. From this point of view Esperanto is simplified English or French. . . . The national language is useful to express national ideals; the international language to express international ideals. And in the eyes of Zamenhof the great international ideal is "brotherhood and justice among all peoples." "All

mankind must be united into one family," he said; and the language through which this human family expresses itself is Esperanto. . . . Those who may think that Esperanto is a spent force forget that there are some 1600 Esperanto "consuls" (called "delegates") all over the world; that every year an International Congress is held at which the delegates number over a thousand; that the language is in actual use (for example, I use it to keep in touch with some forty people in many different countries); that some 5000 different works have been published in it; and that the League of Nations uses it as one of the languages in which it prints the report of its Labor office.

And "D.B.E.A." Mr. Zimmern says: Use the many other pathways to the understanding of nations, through their music, their art." I have loved the music of Poles and Hungarians all my life, but I am sure if I travelled in their countries this art would not enable me to converse with those people, whereas Esperanto would help me perfectly to make friends and to explain all my needs.

Sano G. Wheeler confesses "it took me seven years to learn English; I learned Esperanto in three months. A waste of six years and nine months, which could have been made good use of in other ways. Furthermore, I said I learned (?) English in seven years, but in truth I did not know English until I had learned Esperanto.

"I have been in places where I have found English and not Esperanto, but I have also been into Central South America, where I have found Esperanto and not English."

It is good to know that waves of pro-Esperanto letters flood the sanctuary of any editor who nowadays opens his columns to the I.L. question.

ESPERANTO AND THE VIENNA PRESS.

The "Volkezeitung" one of the largest newspapers in Vienna, with a circulation of 125,000, has decided to print regularly in its Sunday supplement an Esp-o course. The course was preceded by a series of important articles on the growth of Esperanto throughout the world. "Das Kleine Volksblatt" also announces an Esperanto course.

FRENCH CONSUL APPROVES.

"While holding my mother tongue in the highest love and reverence I extend my hearty sympathy to the Esperanto movement and express my respect for its ingenious and self-sacrificing author, Dr. Ludovic Zamenhof. I have no doubt that the language makes steady progress and that it is destined to play an important part in the diffusion of comprehension and goodwill among the peoples. I believe it to be an instrument that will aid in no small measure the efforts of those who are endeavoring to lead the world to a consciousness of its fundamental unity."

—Signed: RENE TURCK, Consul for France, with very best regards.

QUERY CORNER.

Readers are invited to send in questions of general interest relating to the grammar or history of Esperanto.

W.E. in M. "He will not do this thing, because he loves me." The presence or absence of the comma makes all the difference in the meaning of the English. Translate by (1) Pro tio, ke li amas min, li ne faros ĉi tion. (Lia amo al mi detenas lin fari la agon. (2) Ne estas pro amo al mi, ke li ne faros ĉi tion, aŭ ĉi tiun agon.

B. in S. "Malgraŭ pluvetis" is bad. Write malgraŭ tio, ke pluvetis; malgraŭ pluveto, or maldensa (mallonga, nedaŭra according to the sense) pluvo. "Malgraŭ" is a preposition and requires a noun in the nominative after it.

T.K. in B. "La ĵus parolinto" is better avoided. Write "tiu, kiu ĵus parolis" or "la ĵusa parolinto."

E.T. in D. "Konkludi" does not mean to finish, but to form a final judgment, to infer or arrive at by reasoning.

A.Y. in S. "To record an event," kroniki aferon, okazintaĵon.

"A sports record," sporta rekordo.

OKCIDENTA AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO.

8-14a de Oktobro.

Citiujare okazos la datreveno de la ŝtato Okcidenta Aŭstralio kaj tial multo da homoj certē iros tien por ĉeesti la sporton kaj ceterajn allogojn dum Oktobro. La kongresa programo entenas paroladojn en kaj pri Esperanto, vojaĝojn tra kamparo, viziton al la Reĝa Ekspozicio de Cef-

produktaĵoj, motorciklajn kurkonkursojn, ĉian sporton, kaj fine ĉiunacian balon.

Partoprenontoj ŝupre informu s-rojn L. Mansfield, 49-63 Royal Arcade, Perth. Kongreskotizo estas 21 ŝil., rajtiganta la paginton je membrokarto donanta bonajn rabatojn.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni danke kvitancajn ricevon de abonoj jene:—Miss Sinnotte 10/-, Dec. '29; C. H. O'Dwyer, 4/6, Dec. '29; O. Betucken 4/6, Jan. '30; R. Cleary 4/6, Aprilo '30; W. A. Esp. Club 4/6, Majo '30; Miss E. Carrick 4/6, Mar. '30; M. Cecich 5/-, Aprilo '30; E. Huebner 4/6, Apr. '30; Wellington Esp. Club, abono-anonco 10/6, Feb. '30; C. Dornbusch 4/6, Junio '29; Auckland E. Soc. 3/6; A. Cohen, 4/6, Junio '29; H. Racer, 5/-, Majo, '30.

INGENIEROJ.

Pere de s-ro Takahaŝi ni ricevis jam alvokon al Tehnika Kongreso Internacia en Tokio havota Okt-on ĝis Novembro, 1929. Jam 350 aliĝintoj el Eŭropo k. Ameriko sin anoncis, kaj Esp-o estos proponata k. diskutata ĉe mas-kunsido. Ĉiu ingeniero pruntu forton al la Kongreso perĉeeste aŭ vorte!

IMPORTANT.

Would supporters and subscribers kindly make out all money-orders to "R. Banham, Melbourne." Postalnotes may either be left open or made out in the same way.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.)

Sek.: F-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Vic. E10.

TRADUKO 13.

Vere estas (1), ke estas tradukistoj kaj interpretistoj, sed kleraj, kompetentaj tradukistoj nek estas multaj nek malmultepage laboras. El la libro de fraŭlino (2) Pankhurst mi ĉer-

pas la informon, ke dum la jaro mil-naŭcent-dudek-sesa la Geneva oficistaro de Ligo de Nacioj enhavis, krom stenografistoj kaj maŝinskribistoj, dudek naŭ tradukistojn kaj interpretistojn, la sumo de kies salajroj estis deko naŭ mil okcent funtojn sterlingajn. Konsideru ankaŭ, ke la ligo estas nur modesta komenciĝo de granda politika tutmonda organizo (3), kiu devas fariĝi post ne tre longa tempo.

En la nuna tempo de malmultekosta vojaĝado, de interŝanĝado de komercaĵoj inter ĉiuj partoj de la mondo, de aeroplanoj (4), de radia disaŭdigado (5) kaj de internacia scienco kaj mondpolitiko ŝajnas, ke estas urĝa bezono, ke komercistoj, teknikistoj, literaturistoj, politikuloj kaj efektive ĉiuj, povu facile ekinterŝanĝi kun aliandanoj kaj lerni de tiuj pli ol ili povus lerni vizitante (6) fremdajn landojn kiel langoligitaj turistoj. La vorto "international" (t.e. internacia) estis elpensita de Jeremy Bentham en la jaro mil-sepcent-okdeka, kaj jam nun la mondo bezonas internacian lingvon.

Mi ankaŭ menciu lastatempan inventon — la "parolanta filmo," kiu tre progresas al teknika perfekteco. Kiam oni prezentis la "parolantan filmon" de Axel Petersen kaj Arnold Poulsen antaŭ malgranda vidantaro en Kopenhago, miaj pensoj saltis al la tempo, kiam per tiu ilo, kiu kunigas en si la proprecojn de kinematografo kaj radio-telefono, oni povos vidigi, aŭdigi kaj komprenigi teatraĵojn kaj parolojn ĉie en la mondo kaj pli utiligi la servadon de la instrumento per la uzo de internacia lingvo.

(Fino.)

NOTARO 13.

1. Rimarku la uzon de adverbo (ne adjektivo) en senpersona esprimo (Cox 245; Ekz. 17/11, 19/1). — 2. Notaro 2/4. — 3. Ordinare estas bone tiel konstrui frazon, ke la plej proksima vorto antaŭ la relativa pronomo "kiu" estu la rilatanta substantivo (ĉi tie "organizo"). — 4. "aeroplano" es-

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

tas multe uzata. — 5. Oni vidas uzataj "disaŭdig'" kaj "brodkast'". Tiu ĉi lasta troviĝas en "International Radio Manual" de Epton. — 6. Adverba partecipo. Notaro 2/10.

"HUMANITARISTAJ PRINCIPOJ KAJ INTERNACIO DE INTELEKTULOJ."

En Nov., 1921, Eugen Relgis, fondinto de Rumana humanitarisma movado, per libro supretitolita provis starigi fundamenton de la hom. doktrino, per kiu ĝi povu eligi el al nuna sentimentala nebulaĵo, kaj aperu kiel vera scienco bazita sur la biologia evoluo de la homa speco, sur la tuta progreso de la civilizo kaj de la homa spirito. Cititaj estas kelkaj intelektulaj internacioj, kies programoj tamen baziĝas trolime sur nur partecaj ideoj. Ilia agado tial estas nur izola, fragmenteca. Dume, la eroj de la vera Internacio de la Intelektuloj ankoraŭ sin serĉas, reciproke, por kune formi unuecan tuton nedetruiblan. Sed kiu estas la supera ideo ilin unuigonta? Kia estas la supera doktrino, la Vero, kiu estu samtempe ĉe la bazo de tiom da partaj veroj? Nun sekvas kritiko de la Internacio de la Proletarioj. Ĝia agado estas limita de fera kadro. "La Kapitalo" de Marx estas sintezo de la evoluo de l'homa socio, sed nur el la vidpunkto ekonomia. La absoluta dualismo de la socialistoj — ekspluatistoj kaj ekspluatitoj — ne klarigas ĉion. La socialismo konduki(a)s ankoraŭ la subpremitajn amasojn al celoj ne ankoraŭ definitivaj. Tiom da abismoj troviĝas sur la vojo, tiom da herezoj embuskas ĉe la vojkurbiĝoj. La batalo interpopola ŝajnas esti anstataŭita de la interklasa batalado. La milito estas anstataŭita de la revolucio. Lo homaro dividiĝas en du partojn: regantoj kaj regatoj, kaj la lasta denove diserigigas en partiojn malamikajn.

Legante ĉi-libreton mi konstante pensis pri la diro de tiu belspiritulo, Romain Rolland:— . . . Esperanto faros elekton inter la spirito en la tuta mondo, ĝi kungrupigos la pensfratulojn, dissemiĝas sur la terglobo kaj disigitaĵoj unuj de la aliaj per la baroj de la lingvoj naciaj. Tiel formiĝos super ĉiuj problemoj pri rasoj, klasoj kaj partioj popolo internacia."

Akcantata tralibre estas la speco unueco de l'homo. "Ĉia dogmo, imperialista aŭ bolŝevika, dia aŭ eĉ es-

tetika, estas partia; ĝi detruas la specan unuecon de l'homaro." Relgis antaŭvidas venon de la Unika Ŝtato, en kiu tempo la homaro ne fariĝos unueca organismo, sed ĝi tiam tutklare sentos, ke ĉiam ĝi estas tia. Jam el kelkaj landoj aliĝas pensgvidantoj al la Relgis-fondaĵo. Inter ili estas: Henri Barbusse, Upton Sinclair, kaj Rabindranath Tagore. Plezure legata precipe de alegoriŝtatoj estos la premiita "Parabolo pri la hodiaŭa vivo"; por la pli aktualemaj la nuna sinteno de la pacifismo rilate Esp-on pritraktita en ĉap. "La lingvo de la pacifismo" donos interesan temon. La S.A.T. (laborista) ricevas riproĉon pro "ĝia vasaliĝo al iu politika partio" malgraŭ ĝia "bela deklaro de principoj." Tio denuncigas kiel grava eraro, kiel la aliĝo de la grupo "Clarke" al la 3a Internacio, kaj Relgis rememorigas al tiuj "politikemaj Esperantistoj, ke Zamenhof ĉiam sciis resti en la kadroj de la universala spirito de la lingvo, kiun li kreis."

Malkare havata soci-studaĵo. Prezo: ses penceoj ĉe Belga Esperanto-Inst. 11, Kleine Hondstraat, Antverpeno. (Robo)

EL LETERO EL SOVETUNIO.

"La murgazetoj en nia lando naskiĝas kun la Oktobra Revolucio. Oni povas nomi ĝin murgazeto ne nur pro tio, ke ĝi pendas sur la muro, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi iafaje proksimiĝas laŭ sia grandeco al granda parto de la muro. Cetere oni jam prave batalas kontraŭ tiu senlima kresko de la formato, ĉar la gazeto fariĝas malfacile legebla.

Ne ekzistas fabriko aŭ laborejo, institucio aŭ lernejo, organizo, aŭ societo, kiu ne eldonas sian propran murgazeton. Laŭ milionoj oni povas kalkuli la legantojn de la murgazetoj, laŭ centmiloj iliaj kunlaborantoj. La murgazeto estas la pulso de la kolektiva vivo. Ĝia kulturkleriga, politika, organiza kaj disciplina signifo kaj efiko estas ne malpli, se ne pli granda, ol tiu de la lokaj aŭ centraj presorganoj. Ili pritraktas ĉiujn politikajn, ekonomiajn, industriajn, kaj kulturajn temojn en hejmlanda kaj internacia skalo, sed krom tio ĉiun temon, kiu povas interesi la anaron de tia aŭ alia kolektivo el profesia, socia aŭ kulturkleriga vidpunkto.

Ili estas plene sencenzuraj eĉ por deklaraj infanoj, kiuj povas tute libere kritiki eĉ siajn instruistojn,

same kiel la laboristoj siajn fabrikestrojn. La trouzo de tiu libereco estas malofta, ĉar ĉiuj ordonantoj kaj plenumantoj sentas sin en Sovetunio kamaradoj. Krom tio la kolektivo eldonanta la murgazeton, eĉ la kolektivo de dekjaraj lernantoj, ne permesas absolutajn forestas iaj ajn punoj. Sed as, ke en ĝi aperu kalumnioj. Oni ne forgesu, ke en Sovetiaj lernejoj la interna disciplino en la lernejoj, ne formale, sed esence, estos multe pli bona, ol dum la antaŭrevoluca tempo. Guste la sencenzura murgazeto multe helpas al tio. Ofte la estintaj kunlaborantoj de murgazetoj fariĝas poste kunlaborantoj de lokaj, eĉ de ĉefurbaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Nia urba ĉiutaga ĵurnalo, "Ūrala Laboristo," gvidas la murgazet-movadon en nia urbo kaj distrikto (ĉar en vilaĝoj ankaŭ estas eldonataj murgazetoj).

La murgazetoj estas multkoloraj pentrataj. Tiel la murgazet-movado ne nur helpas al la kreado de estontaj verkistoj, sed ankaŭ de pentristoj kaj ilustrajistoj el inter la plej vastaj rondoj de la popolamasoj."

AL LA GRUPOJ!

Estas bedaŭre, ke tiom malmultaj grupoj anoncas en Suda Krucio. Pro malesto de anoncoj devas ŝajni al alilandaj gazetoj, ke la movado en Aŭstralio kaj Nov-Zelando estas tre malforta. Plue pro tiu malesto vojaĝantaj Esp-istoj ne scias, kie estas grupo, kiun ili povus viziti. Unu tia informis, ke dum jaroj li pensis, ke la sola grupo en N.Z. estas la Wellington. Tamen estis aliaj. Trilinia anonco je kosto de ŝilingo estus sufiĉa, ĉar nur estus necese doni nomon de grupo, lokon kaj daton de kunveno kaj nomon-adreson de la sekretario.

A LIVING LANGUAGE.

Prof. Charles Baudouin, poet and litterateur, says, "I find that I can write my poems in Esperanto as easily as I can in my mother tongue, French."

AL KONTRIBUANTOJ.

Bv. lasi 1½-colan marginon kaj interlinajn spacojn ĉe sendoj, ĉu masine—ĉu plumskribitaj. Tio donas lokon por eventualaj vortenmetoj, frazaliĝoj k.s. Plaĉe estas ricevi klarlitere legeblajn verkajojn, precipe tiujn senpere batitajn de la klavoj; tamen helnigraj kopioj ne tre ĝenas. Ĉiu Esperantaĵo devas esti skribita per maŝino. Plukonsile, tenu memore, ke ms. devas kusi ĉe Box 731F ne pli malfrue ol la 28a de la monatoj, se vi volas ĝisdatan aperigon de via materialo.

VARTEJAJ RIMOJ.

Eta Jaĉjo Kornulo, en lia angulo
Tre gaje sidadis, tre vole manĝadis
Kristnaskan pastecon, maĉadis: kaj do
Dikfingro eniris, prunegon eltiris,
Kaj Jaĉjo, li diris:—

Kia knabo bonega mi estas, ho ho!

Fraŭlineto Mufeto sur mola tufeto
Jen sole ŝi longe sidadis,
Kaj ĝue, frandeme gustadis
Selakton, kazeon manĝadis!
Sed venis pestego, aĉareanego:
Fraŭlineto Mufeto sur mola tufeto
Ĉe ŝi la pestaĉo kunsidis,
Kaj ŝin terurege forigis,
Fraŭlineton for, for, terurigis!

—H.D.

AL REDAKTOROJ!

Pro spacmanko bv. konstati vi per ricevo regula de S.K., ke ni bone ricevas vian gazeton. Dankon por akurata sendado.

AL POSTISTAJ ESPERANTISTOJ.

M. Robert Filliatre, 28 rue de l'Agent Dufraine, L'ecole, Francujo, tre volas kontaktiĝi kun poŝtoŝicejanoj en Sidnejo aŭ Melburno; proponanta al unu tiaj aŭstralian delegitecon de la "Interligilo de la P.T.T."

SANO — SANA — SANIGA. DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

LE NEKONATA SOLDATO.

Sabaton, la 11an de Aŭgusto, multaj parteprenantoj en la XXa Universala Kongreso de Esperanto veturis al Bruselo. Interalie ili iris al la tombo de la belga nekonata soldato kaj metis sur ĝin florgarbon.

En la Esperanto-movado ankaŭ estas multaj "nekonataj soldatoj," kiuj en silento, nebruante pacience fordonas sian plej bonajn fortojn por nia sankta afero. Ili ankaŭ ne celas, eĉ ne pensas pri ebla famo. En la oficialaj rondoj oni ne konas ilin, oni ne parolas pri ili; neniam iliaj nomoj estas menciataj. Ili ankaŭ ne deziras tion, sed simple daŭrigas persiste la alprenitan taskon, ĉar en ilia senambicia nemakulita koro arde brulas la vera, nedifektita sankta fajro, kiun nenio povas malpliigi aŭ estingi. Ilia agado estas despli nobla; despli plene ili reprezentas la veran bildon de la sinforĝesema apostolo por la alta celo de la Esperanto-movado.

La "nekonata soldato" estas por ni la personigo de la plej pura, la plej perfekta, la ideala esperantisto. Nomon li ne postlasas; sed restas la rezultato de lia humila agado, kiu starigas por la nedetruiblan, neniam malapareblan monumenton.

J. Jacobs.

—El Bulteno Antverpena E. Kom.

"Some have said to me that it will take 50 or 100 years for Esperanto to be established. Even so, I replied, if it enables us to understand the other nations now, then let us get to work and use it today without waiting all those years. Then, others have said English will be the international language 100 years hence. Even so again, we are not going to wait a century—we require the use of an international language now."—Mr. Amos, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

"So numerous are the rules and exceptions of French and Latin that the learning of these languages becomes merely a memory test, whereas in the case of Esperanto, study comprises the application of common sense."—Mr. Combs, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

"A great deal of the English spoken by foreign delegates at the last in-

ternational gathering which I attended, was quite unintelligible to me."—Mr. Amos, Educationists' Esperanto Meeting, Wellington.

AŬSTRUJO.

La ministerio por Komercio kaj Trafiko, Wien, ĉi-jare eldonas eĉ pli grande imponan broŝuron pri sia belrica montlando. Vera artaĵo, kun ampleksa landkarto kaj plendetaloj, ĝi parolas forte pri antaŭiro de E-to en Aŭstrujo.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadoj al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.